# *Morena subtenas la meksikan prezidenton kaj ties regadplanon.*

Meksiko, 4 mar (RHK) La movado nacia regenerado (Morena) subtenis la meksikan prezidenton Andrés Manuel López Obrador, lian regadplanon kaj la instituton de politika formado de la partio, la? konfirmis ties prezidantino Yeidckol Polevnsky.

La registara gvidantino sciigis al la ?urnalistoj pri kelkaj interkonsentoj de la Nacia Konsilantaro, kiu priskribas la preparon de la venontaj kandidatoj al la prezidanteco de la respubliko, guberniestroj, deputitoj, senatanoj, sindikatestroj, regantoj kaj publikaj funkciuloj kiuj eliros el tiu politika partio, raportis la informagentejo Prensa Latina.

Dum la kunsido oni decidis impulsi, kiel strategia prioritato, la aprobon de  la konstituciaj reformoj impulsataj de la prezidento de la respubliko en la Kvara Transformo, kiu inkluzivas la edukan reformon, la eliminon de la konstitucia privilegio, revokon de mandato kaj popolan konsulti?on.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/184977-morena-subtenas-la-meksikan-prezidenton-kaj-ties-regadplanon

# Radio Habana Cuba